

& Laŭ vidpunkto de heliko:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 296 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butiko, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sama melodio kiel por Interkona balado maĵore kaj simila rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:37> (

(#Maĵore: a;do /dodo doTi dore mi;fa soso somi dodo doomi;mi remi reTi SoTi re;mi dodo doTi dore mifa;)

(#Rekantaĵe: mi mido LaLa Lado; mimi remi fami; rere reTi SoSo SoTi; rere dore mire; doTi LaTi dore miSi La La)

)×8)+

(&Strofoj:

'1 Prin/tempo pulsus tra l' ĝarden', ;
Petolo tiklis la naturon; En freŝa roso
de l' maten'; Heliko flaris aventuron..

(×: **Dankon! La lokon donu ;
dekstren en la ĉeno ; ke ni ankaŭ tiun
konu ; ĝojaj ĝis reveno ; kaj aŭskultu
ĉion ĝis mateno.**)

'2 Precize.. ĉarma helikin' ; Vekiĝis
meze de legomo ; Kaj scivoleme tiris
sin ; Kokete el la konka domo.

'3 Ĉu estas io sur la ter' ; Pli bela,
nobla, eleganta ; Ol tiu helikin-aper'? ;
(Almenaŭ por helik' amanta?)

'4 Pli ol poeto la helik' ; Reteni povas
siajn sentojn, ; Li ne deklame per lirik' ;
Diskrias ilin sur tegmentojn,

'5 Sed tamen kreskis pli kaj pli ; Nun
lia kor' kaŭĉuk-elasta ; Ĝis kiam lia
dom' al li ; Subite ŝajnis tro malvasta.

.....

'6 Neeble nun akcepti ŝin ; Ĉe li kun
ama reciproko, ; Ĉar por helik' kaj
helikin' ; En unu dom' ne estas loko!

.....

'7 Kaj vi mensogis, ho poet', ; Per tiu
verso kaj deklaro, ; Ke.. "plej malgranda
kabanet' ; Sufiĉas al amanta paro.."

'8 Kruela moko de l' destin', ; Ke
malgraŭ propra konkkastelo ; Heliko
nun kaj helikin' ; Sin treni devis al..
hotelo!